

20 KRIMO EN KABANO

"Ekstaru, akuzito," diris prezidanto de tribunalo. "Do la akuzo kulpigas vin, ke vi murdis vian bopatron Franciskon Lebedu; dum la enketado vi konfesis, ke trifoje vi batis lin per hakilo en la kapon intencante lin mortigi. Do, ĉu vi sentas vin kulpa?"

La laborkonsumita vireto ekstremis kaj ion englutis. "Ne," li elbuŝigis. "Ĉu vi mortigis lin?" "Jes." "Do vi sentas vin kulpa?" "Ne."

La prezidanto de la tribunalo havis anĝelan paciencon. "Vidu, Vondráček," li diris, "estas pruvite, ke jam foje vi volis lin veneni; vi donis en lian kafon venenon kontraŭ ratoj. Ĉu vero?" "Jes." "El tio videblas, ke jam pli longan tempon vi avidis pri lia morto. Ĉu vi komprenis al mi?"

La vireto snufis kaj senkonsile ŝultrolevis. "Tio estis pro la trifolio," li balbutis. "Li vendis la trifolion, kaj mi diradis al li, patro, lasu la trifolion, mi aĉetos kuniklojn -" "Atendu," interrompis lin la prezidanto de la tribunalo. "Ĉu la trifolio estis lia aŭ via?" "Nu, lia," murmuris la akuzito. "Sed por kio li bezonas la trifolion? Kaj mi diradis al li, patro, lasu al mi almenaŭ la kampon, kie vi havas la luzernon, sed li respondis, kiam mi mortos, ricevos tion Maria, via edzino, kaj poste vi povos fari kun tio, kion vi volas, vi nekontentigebla avidulo."

"Ĉu tial vi volis lin veneni?" "Jes, tial." "Ĉar li insultis vin?" "Ne. Tio estis pro la kampo. Li diris, ke li vendos la kampon." "Sed, homo," ekvortis la prezidanto, "ĝi estis ja lia kampo, ĉu? Kial li ne darfu ĝin vendi?" Akuzito Vondráček ekrigardis riproĉe la prezidanton. "Apud tiu kampo mi havas ja kampstrion de terpomoj," li klarigis. "Tial mi aĉetis tion, por ke ĝi foje estu kun la kampo kune, kaj li diris, via kampstrio ne koncernas min, mi tion vendos al Joudal." "Vi do vivis en malpaco," helpis la prezidanto. "Nu jes," diris Vondráček morne.

20 ZLOĈIN V CHALUPĚ

"Vstaňte, obžalovaný," pravil předseda soudu. "Tedy žaloba vás viní, že jste zavraždil svého tchána Františka Lebedu; při vyšetřování jste doznal, že jste ho třikrát uhodil sekerou do hlavy v úmyslu zabít ho. Tak co, cítíte se vinen?"

Zedřený mužík se zachvěl a něco polkl. "Ne," vypravil ze sebe. "Zabil jste ho?" "Jo." "Tedy se cítíte vinen?" "Ne."

Předseda soudu měl andělskou trpělivost. "Koukejte se, Vondráčku," řekl, "ono vyšlo najevo, že jste ho už jednou chtěl otrávit; dal jste mu do kafe jed na krysy. Je to pravda?" "Jo." "Z toho je vidět, že jste mu už delší dobu bažil po životě. Rozuměl jste mi?"

Mužík potáhl nosem a bezradně pokrčil rameny. "To bylo skrz ten jetel," koktal. "Von prodal ten jetel, a já mu říkal, táto, nechte ten jetel, já koupím králíky –" "Počkejte," přerušil ho předseda soudu. "Byl to jeho jetel, nebo váš?" "No jeho," mumlal obžalovaný. "Ale nač von potřebuje jetel? A já mu říkal, táto, nechte mě aspoň to pole, co máte tu vojtěšku, ale von povídá, až umřu, tak to dostane Mařka, jako má žena, a pak si s tím dělej, co chceš, ty hlade hladová."

"Proto jste ho chtěl otrávit?" "No jo." "Proto, že vám nadával?" "Ne. To bylo skrz to pole. Von řek, že to pole prodá." "Ale člověče," vyhrkl předseda, "vždyť to bylo jeho pole, ne? Proč by to nesměl prodat?" Obžalovaný Vondráček se podíval vyčítavě na předsedu. "Dyť já mám vedle toho pole takovej proužek brambor," vysvětloval. "Já to koupil proto, aby to jednou s tím polem přišlo dohromady, a von řek, co mně je po tvým proužku, já to prodám Joudalovi." "Tak vy jste žili v nesvárech," pomáhal předseda. "No jo," řekl Vondráček zamračeně.

"Tio estis pro la kaprino." "Pro kiu kaprino?" "Li melkis mian kaprionon. Mi diradis al li, patro, lasu la kaprionon, aŭ donu al mi la herbejon apud la rivereto. Sed li farmigis la herbejon."

"Kaj kion li faris per mono?" demandis unu el la asizanoj. "Kion li faris," diris la akuzito malserene. "Li kaŝis ĝin en kesto. Kiam mi mortos, li diradis, vi ricevos tion. Sed morti, tion li ne volis. Ja li estis jam pli ol sepdekjara." "Do vi diras, ke pro la malpacoj kulpis via bopatro?" "Jes, kulpis," opiniis Vondráček hezite. "Li volis nenion doni. Dum mi vivas, li diradis, mastrumas mi kaj sufiĉe. Kaj mi diris al li, paĉjo, se vi aĉetu bovinon, mi plugos la kampon kaj ne necesos ĝin vendi. Sed li diris, kiam mi mortos, aĉetu al vi eĉ du bovinojn, sed tiun mian kampstrion mi vendos al Joudal."

"Aŭskultu, Vondráček," diris la prezidanto severe, "ĉu vi mortigis lin pro la mono en la kesto?" "La mono estis por la bovino," diris Vondráček obstine. "Ni kalkulis, kiam li mortos, ke por ĝi estos bovino. Tia bieno ne povas esti sen bovino, jes. De kie mi prenu sterkon."

"Akuzito," interrompis lin prokuroro, "ne temas pri la bovino, sed pri la homa vivo. Kial vi mortigis vian bopatron?" "Ĝi okazis pro la kampo." "Tio estas neniun respondo!" "Li volis la kampon vendi -" "Sed la mono post lia morto ĉiukaze restus al vi." "Jes, sed li ne volis morti," diris Vondráček indigne. "Sinjora moŝto, se li estus mortinta kompleze - Neniam mi faris al li ion malbonan. Tion atestos la tuta vilaĝo, mi traktis lin kiel propran patron, ĉu ne estas tiel?" li diris, turnante sin al la publiko. Aŭditorio, kie sidis duono de la vilaĝo, konsente ekmuĝis.

"Jes," aŭdiĝis la prezidanto serioze. "Kaj tial vi volis lin veneni, ĉu?" "Veneni," murmuris la akuzito. "Do li estus ne devinta vendi la trifolion. Sinjora moŝto, ĉiu atestos al vi, ke la trifolio devas resti hejme. Alie ĝi ne estas bona mastrumado, ĉu?" La aŭditorio ekmurmuris konsente.

"To bylo skrz tu kozu." "Pro jakou kozu?" "Von mně vydojil kozu. Já mu říkal, táto, nechte tu kozu, nebo nám dejte tu loučku u potoka. Ale von tu louku pronajal."

"A co dělal s penězi?" zeptal se jeden z porotců. "Co by dělal," pravil obžalovaný zasmušile. "V truhle je schoval. Až umřu, říkal, tak to dostanete. Ale umřít, to von nechtěl. Dyť už mu bylo přes sedmdesát." "Tedy vy říkáte, že těmi sváry byl vinen váš tchán?" "To byl," mínil Vondráček váhavě. "Von nechtěl nic dát. Dokud jsem živ, povídal, tak hospodařím já, a basta. A já mu povídám, tatínku, kdybyste koupil krávu, tak já to pole zvorám, a nemusí se prodávat. Ale von řek, až umřu, tak si kup třeba dvě krávy, ale já ten můj pruh prodám Joudalovi."

"Poslyšte, Vondráčku," pravil předseda přísně, "nezabil vy jste ho pro ty peníze v truhle?" "Ty byly na krávu," řekl Vondráček zarytě. "To jsme počítali, až von umře, to bude kráva. Taková chalupa nemože bejt bez krávy, že jo. Kdepak mám vzít hnůj."

"Obžalovaný," vpadl do toho státní zástupce, "nám nejde o krávu, ale o lidský život. Proč jste zabil svého tchána?" "To bylo skrz to pole." "To není žádná odpověď!" "Von chtěl to pole prodat -" "Ale peníze by vám po jeho smrti stejně zůstaly!" "Jo, ale von nechtěl umřít," pravil Vondráček pohoršeně. "Milostpane, kdyby byl umřel po dobrým - Já mu nikdy nic zlého neudělal. To dosvědčí celá vesnice, já ho měl jako vlastního otce, no že jo?" řekl, obraceje se k publiku. Auditorium, kde zasedalo půl vesnice, souhlasně zašumělo.

"Ano," ozval se předseda vážně. "A proto jste ho chtěl otrávit, že?" "Votrávit," zabručel obžalovaný. "Tak neměl prodat ten jetel. Milostpane, to jim každě dosvědčí, že jetel má zůstat doma. To nejní žádný hospodářství, no že jo?" Auditorium zabručelo na souhlas.

"Turniĝadu je mi, akuzito," ekkriis la prezidanto. "Alie mi igos elkonduki homojn el via vilaĝo. Diru al ni, kiel okazis la murdo.

"Nu," komencis Vondráček hezite, "tio estis dimanĉe, kaj mi vidis, kiel denove li parolas kun Joudal. Patro, mi diras al li, la kampon vi ne darfis vendi for de mi. Sed li diris, nu cin mi demandas, ĉi brikisto. Do mi diris al mi nun estas plej urĝa tempo, jes. Kaj mi iris fendi lignon." "Ĉu per ĉi tiu hakilo?" "Jes." "Daŭrigu!"

"Vespere mi diras al la edzino, iru al la onklino kaj kunprenu la infanojn. Ŝi komencis tuj plori. Ne ploru, mi diras, antaŭe ankoraŭ mi parolos kun li. Kaj poste li venis en la remizon kaj diris, tio estas mia hakilo, redonu ĝin! Kaj mi diris al li, ke li melkis mian kaprinon. Post tio li volis elŝiregi de mi la hakilon. Kaj mi hakis lin." "Kial?" "Tio estis pro la kampo." "Kaj kial vi hakis lin trifoje?" Vondráček ŝultroskuis. "Tiel jam - Sinjora moŝto, niulo estas kutima peze labori." "Kaj poste?" "Poste mi enlitiĝis."

"Ĉu vi dormis?" "Ne, mi kalkulis, kiom koston la bovino, kaj ke la herbejon mi interŝanĝos por la kampstrio ĉe la vojo. Poste ĉio estos kune." "Kaj ĉu la konscienco ne turmentis vin?" "Ne. Min turmentis, ke la kampoj ne estas kune. Kaj poste necesos reordigi stalon por la bovino, tio koston ankaŭ kelkcent. Ja la bopatro eĉ ne veturilon plu havis. Mi diradis al li, patro, Dio pardonu al vi la pekojn, sed ĉi tio ne estas mastrumado. La du kampoj volas esti kune, tion diras jam la sento."

"Kaj kun la maljuna homo vi ne havis kunsenton?" ektondris la prezidanto. "Ĉar ja li volis la kampstrio vendi al Joudal," balbutis la akuzito. "Do vi murdis lin pro profitavido!" "Tio ne estas vero," defendis sin Vondráček tremante. "Tio estis pro la kampoj! Se la kampoj estus kune - "

"Ĉu vi sentas vin kulpa?" "Ne." "Murdi la maljunan homon, ĉu tio estas nenio por vi?" "Ja mi diras, ke tio estis pro la kampoj," eksplodis Vondráček preskaŭ singultante. "Ja tio ne estas murdo! Jesuo Maria, tion devas ĉiu kompreni!"

"Obracejte se ke mně, obžalovaný," křikl předseda. "Nebo dám vaše krajany vyvést. Povězte nám, jak se stala ta vražda."

"No," začal Vondráček váhavě, "to bylo v neděli, a já viděl, jak zase mluví s tím Joudalem. Táto, povídám mu, to pole mně nesmíte prodat. Ale von řek, to víš, tebe se budu ptát, ty cihláři. Tak jsem si řek, že už je nejvyšší čas, že jo. Tak jsem šel štípat dříví." "Byla to tahle sekyrka?" "Jo." "Pokračujte!"

"Večer povídám ženě, jdi a vem děti k tetě. Vona hned začala brečet. Nebreč, povídám, já s ním dřív eště promluví. A von pak přišel do kůlničky a řek, tohle je má sekyrka, dej ji sem! A já mu řek, že mně vydojil kozu. Nato von mně chtěl vydrat tu sekyrku. Tak jsem po něm seknul." "Proč?" "To bylo skrz to pole." "A proč jste ho seknul třikrát?" Vondráček pokrčil rameny. "To už tak – Milostpane, našinec je zvyklej na těžkou práci." "A pak?" "Pak jsem si šel lehnout."

"Spal jste?" "Ne. Já jsem počítal, co bude stát ta kráva, a že tu louku vyměním za ten cípek u cesty. Vono to pak bude pohromadě." "A svědomí vás netrápilo?" "Ne. Mě trápilo, že ty pole nejsou pohromadě. A pak se musí spravit chlív pro tu krávu, to bude taky stát pár stovek. Dyt' von tchán už neměl ani vůz. Já mu říkal, táto, pánbůh vám hřichy odpust', ale tohle nejní hospodářství. Ty dvě pole chtěj k sobě, to už dá cit."

"A se starým člověkem jste cit neměl?" zahřímal předseda. "Když von chtěl ten proužek prodat Joudalovi," koktal obžalovaný. "Tedy vy jste ho zavraždil ze ziskuchtivosti!" "To není pravda," bránil se Vondráček rozechvěně. "To bylo pro to pole! Kdyby ty pole přišly dohromady –"

"Cítíte se vinen?" "Ne." "Zavraždit starého člověka, to pro vás nic není?" "Dyt' říkám, že to bylo skrz to pole," vybuchl Vondráček téměř vzlykaje. "To přece není žádná vražda! Ježíšmarjá, tomu přece každej musí rozumět!"

Sinjora moŝto, ja tio estis en la familio! Al iu fremda mi ne farus tion - Neniam mi ion ŝtelis... demandu pri Vondraček... kaj oni arestis min kiel ŝteliston, kiel ŝteliston," ĝemis Vondraček, sufokante sin pro bedaŭro. "Ne, sed kiel patromurdinton," diris la senatestro malgaje. "Ĉu vi scias, Vondraček, ke je tio estas mortpuno?" Vondraček mungis kaj ploretis. "Tio estis pro la kampo," li diris rezigne; post kio la proceso treniĝis plu: atestantoj, pledoj...

Dum la asizo foriris por konsiliĝi pri kulpo de akuzita Vondraček, okulvitris la prezidanto enpense tra fenestro de la oficejo. "Entute ĝi estis malforta," murmuris la juĝisto. "Nek la prokuroro iel klopodis, nek la pledanto diris multon... Mallonge, klara kazo, do kial longaj paroloj."

La prezidanto eksnufis. "Klara kazo," li diris kaj mangestis. "Aŭskultu, sinjoro kolego, tiu homo sentas sian pravon same kiel vi aŭ mi. Same, se mi devus juĝi viandiston pro tio, ke li buĉis bovinon, aŭ talpon, ke li faras talpejojn. Homo, de temp' al tempo mi sentis, ke tio tute ne estas mia afero, ĉu vi komprenas, problemo de rajto aŭ leĝo - uf," li respiris kaj demetis talaron. "Mi devas de tio iom ripozi. Sciu, mi opinias, ke la asizo lin liberigos; ĝi estas absurda, sed eble lin liberigos, ĉar... Mi diros ion al vi: mi havas en mi kampulan sangon; kaj kiam tiu homo diris, ke ambaŭ kampoj volas al si, do... mi vidis la du kampstriojn, kaj sentis, se ni estus juĝontaj... komprenu, laŭ Dia leĝo, ke ni juĝu la du kampojn.

Ĉu vi scias, kion mi plej ŝate farus? Plej ŝate mi leviĝus, demetus bireton kaj dirus: Akuzito Vondraček, en nomo de Dio, ĉar la verŝita sango krias al la ĉielo, vi prisemos ambaŭ kampojn per hiskiamo; per hiskiamo kaj dornaĵo; kaj ĝis la morto vi havos antaŭ viaj okuloj tiun novalon de malamo... Mi ŝatus scii, kion dirus al tio la prokuroro. Sinjoro kolego, iam devus juĝi Dio; sciu, li povus ŝarĝi per teruraj kaj grandaj punoj - Juĝi en nomo de Dio; sed je tio ni ne sufiĉas - Kio, la asizo jam interkonsentiĝis?"

Milostpane, dyt' to bylo v rodině! Cizímu bych to neudělal – Já jsem nikdy nic neukrad... zeptejte se na Vondračka... a voni mě sebrali jako zloděje, jako zloděje," sténal Vondraček, duše se lítostí. "Ne, ale jako otcovraha," pravil předseda smutně. "Víte, Vondračku, že na to je trest smrti?" Vondraček smrkal a potahoval. "To bylo skrz to pole," řekl odevzdaně; načež se líčení vleklo dál: svědkové, plaidoyery...

Zatímco se porota odebrala k poradě o vině obžalovaného Vondračka, břejlil předseda zamyšleně z okna kanceláře. "Celkem to bylo slabé," bručel votant. "Ani státní zástupce se do toho jaksi nehnal, ani obhájce toho mnoho neřek... Zkrátka, vyložený případ, jaképak řeči."

Předseda soudu zafuněl. "Vyložený případ," řekl a mávl rukou. "Poslouchejte, pane kolego, ten člověk se cítí tak v právu jako vy nebo já. Mně to připadá, jako bych měl soudit řezníka za to, že porazil krávu, nebo krtka za to, že dělá krtiny. Člověče, mně chvílemi bylo, že to vůbec není naše věc, rozumíte, otázka práva nebo zákona – Fuj," oddechl si a svlékal talár. "Musím si od toho chvílku odpočinout. Víte, já myslím, že ho porota pustí; je to nesmyslné, ale snad ho pustí, protože... Já vám něco řeknu: já jsem selské krve; a když ten člověk říkal, že ta pole chtějí k sobě, tak... já viděl dva pruhy polí, a cítil jsem, kdybychom měli soudit... rozumíte, po nějakém božím zákonu... že bychom musili soudit ta dvě pole.

Víte, co bych byl nejraději udělal? Nejraději bych byl vstal, smekl baret a řekl: Obžalovaný Vondračku, ve jménu božím, protože krev prolitá volá do nebe, oseješ ta dvě pole blínem; blínem a hložím; a do smrti budeš mít před očima ten úhor nenávisti... Rád bych věděl, co by tak tomu řekl státní zástupce. Pane kolego, někdy by měl soudit Bůh; víte, on by mohl uvalit takové strašné a veliké tresty – Soudit ve jménu božím; ale na to my jsme krátkí. – Co, už se porota dohodla?"

Ĝemante pro malemo, la prezidanto vestis sian talaron. "Do, ni iru!
Enkonduku la asizanojn!"

Vzdychaje neĉutí, oblékal si předseda soudu talár. "Tak pojd'me!
Uved'te porotu!"